

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri helpo al kooperativoj en Dahomeo.

La svisa ministro, sinjoro Wahlen, estro de la Federala Departamento pri Politiko, partoprenis la inaŭguron en Frejburgo de interesa ekspozicio. Dum sia parolado la ministro emfazis pri la neceso por la privilegiitaj landoj starigi novajn rilatojn kun ekskoloniaj landoj. Li ankaŭ montris, ke la helpon de registaroj devas kompletigi laboro de la popoloj mem. Li certe pravas.

La inaŭgurita ekspozicio koncernis helpon al Dahomeo, iniciatita de Svisa Kooperativa Unuiĝo. Tiu helpo ŝajnas al mi tre taŭge bazita, kaj eĉ imitenda. Jen kiel ĝi naskiĝis.

Kelkaj svisaj kooperativanoj pensis: « *Se ĉiu svisa kooperativano akceptus cedi parteton de sia rustorno por helpo al kooperativanoj el malprivilegiita lando, ni certe povus rikolti sumon necesan al fruktodona laboro.* » Do lastan jaron, sub la influo de tiuj anoj, Svisa Kooperativa Unuiĝo anoncis tiun proponon de helpo al siaj 750'000 membroj. Ĝi proponis cedon de unu procento de la jara rustorno kaj ĝiaj oficistoj proponis cedon de po unu salajra horo ĉiun trimonaton. Tiu cedo ne estis deviga. Ĝi permesis rikolti dum la jaro unu milionon da frankoj, do sumon sufiĉe altan.

Por sia laboro Svisa Kooperativa Unuiĝo elektis Dahomeon, tio pro diversaj kaŭzoj: ĝi estas politike sendependa lando kun demokrata registaro; ĝi estas lando je la mezuro de Svislando: trifoje pli vasta, sed trifoje malpli loĝata; en tiu lando oni oficiale parolas la francan lingvon, unu el la svisaj naciaj lingvoj, do kontaktoj estas facilaj; kaj la registaro de tiu lando Dahomeo favoras kooperativismon.

Dahomeo estas kamparana lando. La svisaj kooperativanoj do decidis helpi kamparajn kooperativojn. Ili malfermis en la afrika lando seminarion, kiu estis organizita sub la aŭspicio de Unesko por studi kun fakuloj la entreprenotan helpon. Ili poste varbis kapablajn kandidatojn, al kiuj ili donis solidan instruon en Svislando mem ĉe agrokulturaj lernejoj. Poste, dank'al tiuj staĝintoj estis eble jam en 1962 funkciigi kvin kamparanajn kooperativojn, tio en la sudo de la lando ĉe Kome kaj Sakete, kaj en la nordo ĉe Niki.

Sed la svisaj kooperativanoj decidis nur helpi kamparanojn, kiuj antaŭe jam pruvis sian volon vidi sian vivnivelon leviĝi. Por pruvi sian deziron pri pli bona vivo, tiuj kamparanoj devas, antaŭ ol povi ricevi iun ajn helpon, sin grupigi kaj per siaj primitivaj iloj kulturebligi kolektivitan bienon, kiu aree mezuras po unu hektaron por kunlaborantaj geedzoj. Kiam la svisaj kooperativanoj konstatas, ke la kamparanoj tion kapablis mem fari, ili sendas al ili unu staĝinton kun taŭgaj maŝinoj, kiujn li bone lernis funkciigi. Tiam la kamparanoj devas promesi dum la sekvanta jaro duobligi pere de tiuj maŝinoj la kulturareon. Financa helpo permesas raciigi la laboron kaj organizi ne nur la produktadon, sed ankaŭ la vendadon de la kulturitaĵoj. Programo devas esti respektata. Ĝi celas plej rapidan sendependiĝon, ĉu financan, ĉu organizan.

Oni devas eviti fuŝadon de materialo. La plej bona metodo estas ne doni maŝinojn, sed nur pruntedoni ilin. La kamparanoj devas do raciigi sian laboron por kiel eble plej rapide esti kapablaj ne nur repagi tiujn pruntedonitajn maŝinojn, sed ankaŭ povi ilin anstataŭigi, kiam necesos. La kamparanoj devas kompreni, ke ili ne estas almozuloj, sed homoj kapablaj mem gajni sian vivon. Ili komprenas, ke kooperativismo estas la plej taŭga metodo raciigi la uzon de maŝinoj kaj ŝpari monon.

El la kvin kooperativoj, kiuj naskiĝis, kvar bonege funkcias. Unu fiaskis pro la mallaboremo de siaj membroj. Do oni tuj reprenis al ĝi la pruntedonitan traktoron, kiun povos uzi pli laboremaj kamparanoj.

Tiun ĉi printempon fondiĝis ses novaj kooperativoj de kamparanoj. Ĉiuj tiuj kooperativoj estos kontrolataj dum kvin jaroj far fakuloj : librotenistoj, inĝenieroj, inspektoroj, fakuloj. La staĝanoj ricevos daŭran instruon. Kooperativa kamparana banko estas fondita, lernejoj kaj virinaj grupoj ekfunkcias.

Tiu laboro en Afriko estas duobligita de laboro en Svislando. La semajna gazeto de Svisa Kooperativa Unuiĝo pere de artikoloj prezentas la landon kaj ties kutimojn kaj vivkondiĉojn, filmo titolita *Bildoj el Dahomeo* vekas simpatian por tiu afrika lando, kaj la ekspozicio inaŭgurita de ministro Wahlen rondiras de urbo al urbo por montri fotojn kaj objektojn el Dahomeo.

Okaze de la trapaso de tiu ekspozicio en la urboj, prelegoj prezentas la hodiaŭajn problemojn de Afriko. Ekzemple en La Chaux-de-Fonds kaj Le Locle ni povis aŭskulti sinjoron Gbenudon, la prezidanton de la Asocio de la afrikaj studentoj en la Universitato Frejburgo, kiu prezentis al ni du negrajn poetojn : Aimé Césaire kaj Léopold Senghor, poeto, kiu ekde 1930 pere de siaj verkoj redonis al la afrikanoj fieron pri sia raso.

Mi esperas, ke tiu helpo de la svisaj kooperativanoj al afrikaj kooperativanoj permesos iom post iom veran ĝemeliĝon inter du malgrandaj landoj, tio por la bono de ambaŭ. Kiom da junuloj, post la fino de siaj studoj aŭ lernado povus profiti pri la ebleco veturi al la alia lando dum unu jaro por alporti sian helpon aŭ pliigi siajn konojn. Tiu interŝanĝo devus esti konsiderata kiel servo al la patrio, servo tiel valora kiel la soldatservo.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri helpo al kooperativoj en Dahomeo. Ĝis reaŭdo!

-oOo-